# Mikso

## el mia trezoro

kompilis Klaus Friese



# Mikso

el mia trezoro

kompilis Klaus Friese

# Enhavo

Antaŭparolo....................3
Sekretoj de la presilo....................4
Pasporto....................7
Humoro....................8
Programado per BASIC-256....................10
C. Louis Kervran....................16
In-Vitro-Viando*....................20
Esperanto kaj la estonteco....................23
Koro ĉe la plafono....................26
Du nuptaj tagoj kaj kio okazis antaŭ ili....................27
Filozofio en vintro....................34
Anĝelo nomata Hans-Dieter....................38
Trompita....................44
Vera historio el la 50-aj jaroj....................49
La nordfrisa lingvo....................54
Eperanto-reklamo....................60
Konsiloj de ChatGPT 3.5....................62
Esperanto-flago....................64
Salto de la konscio....................65
Mia trezoro....................67
Kolofono....................68

# Antaŭparolo

La reta platformo „mia trezoro“ [*] ofertas al vi miajn kontribuojn por Esperantujo. Tie troviĝas tekstoj, bildoj, muzik-dosieroj kaj e-libroj. La aŭtoro estas ofte mi mem, sed kelkfoje mi sukcesis konvinki ankaŭ aliajn riĉigi mian kolekton. Koran dankon al ĉiuj, kiuj helpis!

Ĉi tiu malgranda kompilo nur montras elektitajn tekstojn. Kelkaj de tiuj estas espereble amuzaj, aliaj celas pensigi la leganton pri pli gravaj aferoj.

---

*[*] esperanto-klaus.de*

## Sekretoj de la presilo

En mia lernejo staras moderna multkapabla komputilo konektita kun eĉ pli mirinda presilo. Per tiu maŝino vi povas fari la plej belajn dokumentojn. Se la stoko de la inko sufiĉas la buntaj klaraj bildoj kaj la diversaj skribmanieroj vere impresas. Nu, tiu maŝino estas la ĝusta por mia celo. Mi ja planis produkti specialajn pasportojn por la junaj lernantoj de mia esperanto-grupo. La ideo estis la jena: Unue ili certe ĝojus pri la posedo de individua esperanto-pasporto, kompreneble kun bela foto. Due mi volis meti mallongajn esperantajn frazojn sur la dorspaĝojn de tiuj pasportoj. Mi jam antaŭ la komenco de tiu projekto fieris pri mia ruzeco. Mia nuna esperanto-grupo estas ja tre malgranda, sed baldaŭ mi havus multe da lernantoj, danke al la novaj esperanto-pasportoj! La nunaj partoprenantoj de mia libervolaj esperanto-horoj certe fanfaronus pri la nova posedaĵo. Perfekta strategio por varbado, ĉu ne? Nu, pri tio mi devos raporti iam poste. La pasportoj ĝis nun ankoraŭ ne estis pretaj...

Mi fotis miajn lernantojn kaj petis ilin skribi siajn individuajn informojn sur papero: adreso, nomo, koloro de la okuloj k. t. p.. Rapide la bildoj migris al la komputilo kaj senprobleme evoluis la novaj esperanto-pasportoj. Mi uzis la WORD-programon kaj post nelonga tempo ĉio estis preta. La prezento sur la ekrano plaĉis al mi. Ek al la printado! Sed, - kial nur la tekstoj estis videblaj? Mankis la belaj bildoj sur papero! Kial? Kial la

maŝinoj ne obeis? Miaj kolegoj ne povis helpi. Jam la tutan semajnon la maŝino ja fuŝas! Oni ne povas printi nek bildojn nek la leterkapon de nia lernejo. Kion fari? Multfoje mi denove instalis la dosieron por la uzado de la presilo. Strange, post la instalo la presprovaĵo bone aspektas. La presilo sekve ne estas difektita! Oni ja bone vidas la multkoloran emblemon de la presilo-firmao. Sed tamen, miaj pasportoj restis sen fotoj. Kiom da multekosta inko mi disipis, - ĝis preskaŭ forgesita okazintaĵo skuis mian kapon.

Antaŭ kelkaj semajnoj du lernantoj el mia 10-a klaso petis min ĉu ili rajtus uzi la komputilon en nia lernejo ĉar iliaj hejmaj maŝinoj ne bone funkciis. Jes, mi bonkore lasis ilin fari; tro fidema mi estis. La tagon poste nia presilo nur produktis spegulan skribon! Nur post longa okupado mi trovis la kaŭzon. La programo WORD ofertas plurajn eblecojn por la printado de tekstoj. Kutime mi neniam ŝanĝas la agordigon, tial mi ankaŭ ne bezonis legi la gravajn informojn. Sed nun mi ekspertis ke nur unu eta hoko en la agordformularo sur la ekrano sufiĉas por ŝanĝi la tutan tekston al spegula skribo. Mia bonhumoro malrapide revenis. La junaj fiaj knaboj el la 10-a klaso sukcese trompis min. Neniam mi denove helpus ilin! Estus granda distanco inter ili kaj la komputilo por la tuta lernojaro!

Jes, tiu travivaĵo trapasis mian cerbon kiam mi pensadis pri la nuna problemo. Kial la sistemo ne printis la fotojn?

La solvo sekvis subite. Jes, WORD ankaŭ ofertas eblecon eviti la printadon de bildoj! Denove mi trovis etan hokon kaj legis la indikon 'nevidebla grafiko'.

Forprenu tion! Kaj nun la pasportoj kun la belaj fotoj de miaj esperanto-lernantoj estas pretaj kaj la tuta grupo ĝojas!

Mi esperas ke vi, kara leganto, ankaŭ profitas de mia raporto. Se ne, mi miras. Kial vi ne helpis min, kiam mi estis malespera kaj forlasita????

*Klaus Friese*

---

*Per **LibreOffice Writer** ne estas tiel facile speguli tekstojn. Vi bezonas la ilon FONTWORK. Unue serĉu la FONTWORK-opcion en la menuo kaj elektu la stilon. Nun aperas unu vorto en tiu stilo sur la ekrano kiel bildo.*




*Klaku sur tiu bildo kaj anstataŭigi la Fontwork-vorton per via teksto. Vi povas speguli ĝin, ĉar la teksto nun sintenas kiel bildo:*



# Pasporto

ESPERANTO-AG-AUSWEIS ESPERANTOSCHULE 2018/19



Name / familia nomo
**Braunbär**

Vorname / antaŭnomo
**Bruno**

Geburtstag / naskiĝtago
**22.02.2222**

Augenfarbe / okulkoloro
**braun / bruna**

Unterschrift / subskribo

Bruno Braunbär

Anschrift / adreso: **43210 Esperantostadt, Bärenweg 123**

ESPERANTO - LA LINGVO INTERNACIA -

| | | | |
|---|---|---|---|
| Saluton! | Hallo! | 0 | nulo |
| Bonan matenon! | Guten Morgen! | 1 | unu |
| Bonan tagon! | Guten Tag! | 2 | du |
| Bonan vesperon! | Guten Abend! | 3 | tri |
| Bonan nokton! | Gute Nacht! | 4 | kvar |
| Mi estas Bruno. | Ich bin Bruno. | 5 | kvin |
| Kiu vi estas? | Wer bist Du? | 6 | ses |
| Ĝis revido! | Auf Wiedersehn! | 7 | sep |
| Ĝis baldaŭ | Bis bald! | 8 | ok |
| Sanon! | Gesundheit! | 9 | naŭ |
| Dankon! | Danke! | 10 | dek |
| | | 100 | cent |
| | | 1000 | mil |

Kursleiter / kursgvidanto: Eisbär, Esperantujo, 01.02.2018

*Prova presado*

Klaus Friese

# Humoro

## Simpla metodo por disvastigi Esperanton

*(La germana teksto troviĝas en mia libro „Fahrtrichtung Esperanto“, p. 25-26)*

En Germanio oni kutime diras 'Gesundheit! (= Sanon!)' se iu laŭte aŭ minimume aŭdeble ternas en la prokimeco. Oni diras tion eĉ al nekonataj homoj. La kutima respondo estas 'Danke! (Dankon!)'. Ĉu vi scias la originon de tiu kutimo? Mi ie legis ke ĝi devenas el mezepoka tempo. Tiam ofte regis la terura malsano pesto kaj unu de la tre fruaj simptomoj estis la inklino al ternado. Sed ankaŭ aliaj malsanoj komenciĝas per tiu simptomo kaj oni nepre deziras, ke tiu signo nur sciigu pri ekzemple sendanĝera malvarmumo. Ofte la homoj tiam diris al si mem 'Kara Dio, protektu min, donu al mi sanon!', aŭ simile. La proksimaj homoj ekkaptis nur la vorton 'Sanon!'. La sekvantaj generacioj ankaŭ uzis tiun moron kaj ne plu pensis pri la signifo.

Dum esperantaj aranĝoj, en klubvesperoj kaj, se vi havas gaston el Esperantujo, vi certe povas konfirmi ke ankaŭ tie montriĝas tiu kutimo, kvankam mi ne scias ĉu ankaŭ aliaj popoloj uzas ĝin tradicie. Iam reveninte el Esperantujo, mi ne plu memoris nek la tagon nek la situacion, mi aŭdis ke iu proksima homo (ne el

Esperantujo!) ternis kaj mi spontanee ne diris 'Gesundheit!' , mi uzis la esperantlingvan vorton 'Sanon!' Subite la respondo estis 'Danke!'. Kompreneble, mia proksimulo evidente reagis en la germana lingvo. Sed atentu! Li tute adekvate respondis ĉar li komprenis min. Do, tiu homo komprenis mian esperantlingvan. vorton 'Sanon!'.

Estas klare, ke mi post tiu travivaĵo ĉiam ripetas diri 'Sanon!' en samaj situacioj. Kaj normale la reago estis ankaŭ la sama. Kelkfoje mi klarigis la aferon kaj kaptis la ŝancon atentigi mian proksimulon pri Esperanto. Tiu metodo funkciis en diversaj lokoj, en la buso, la trajno, en atendejo k. t. p. Nun mi serĉas aliajn parolturnojn kiuj ankaŭ taŭgas laŭ tiu koncepto.

Se ĉiu esperantisto ĉiam uzus tiun metodon, Esperanto estus pli bone disvastigata!


Bonan sukceson!

Klaus Friese

# Pura nostalgio

## Programado per BASIC-256

Verŝajne pasis jam pli ol 35 jaroj …



Mia unua komputilo estis la 'Sharp MZ-700'. Mi bezonis 3-4 minutojn por ŝarĝi la programlingvon BASIC. Tiam mi povus mem fari programojn. Sed fakte mi unue nur tajpis listigitajn programojn. Mi tajpis paĝon post paĝo. Kia feliĉo, kiam mi povis doni la ordonon "RUN" kaj la programo fine startis. Mi interŝanĝis multajn programojn kun komputilaj amikoj el la tuta mondo. Multaj programoj estis 'memfaritaj', malofte aĉetitaj. Ili estis presitaj aŭ stokitaj sur kasedo kaj poste senditaj per poŝto. Interreto ankoraŭ ja ne ekzistis. Ĉio subite ŝanĝiĝis, kiam la novaj komputiloj aperis. Ĉiuj malnovaj komputiloj malaperis. Nun la komputiloj XT aŭ AT regis kaj oni plejparte uzis 'VINDOZON'. Apenaŭ neniu mem skribis programojn. Nur spertuloj kapablis fari tion. Poste, kun la interreto, estis eĉ pli facile ekhavi novan

softvaron. La kontaktoj kun la longtempaj komputilaj amikoj iom post iom disrompiĝis.

Mi devis melankolie konstati, ke mi tute ne plu bezonis fari proprajn programojn, kvankam mi tre ŝatis tian hobion. Sed ne estas facile komenci programadon per la novaj komputiloj. Ekzistas ja multaj programlingvoj. Mi pensis ke estas tre peza laboro lerni tiajn lingvojn. La barilo estis tro alta por mi. Sed nun estas alia situacio!

Mi trovis la programlingvon BASIC-256. Ĝi funkcias sur mia moderna komputilo sub Linukso. Kaj mi jam sukcesis mem verki kelkajn etajn programojn. Rigardu mian ekzemplon.

---

```
# Pentristo

cls
abbruch=asc("Q")
print "Klavo por ĉesigi= ";:print chr(abbruch)
print "Stirado per 8 4 2 6 "
print "eble enŝaltu per  numeroj"
print
print "Forprenu aŭ Ne forprenu per klavo 7/9"

START:
clg: graphsize 400,300: x=200: y=150
gosub TASTE
```

```
print "Ĝis la venonta fojo!"
end

TASTE:
taste=0:loesch=0
while taste <> abbruch
taste=key
if taste=asc("8")then y=y-10
if taste=asc("4") then x=x-10
if taste=asc("2") then y=y+10
if taste=asc("6") then x=x+10
if taste=asc("7") then loesch=1
if taste=asc("9") then loesch=0

gosub FARBE
gosub PINSEL
end while
return


PINSEL:
circle x,y,5
return
FARBE:
if loesch = 0 then color darkred:return
if loesch = 1 then color white:return
```

---

Per tiu programeto vi povas mem pentri sur la ekrano!

Ne ridu! La bildo pruvas, ke mi pentris muson. Por stiri la 'penikon' vi bezonas la klavojn '8,4,2,6'. Per la klavo '7' vi povas estingi la laste metitan punkton. La klavo '9' denove vidigas la spuron de la peniko. Je la fino simple premu la 'Q'-klavon.

Vi certe trovas pli bonan kaj pli elegantan programon por pentrado per BASIC-256. Do, sendu al mi vian proponon!



Jen alia ekzemplo:


```
# Simbolo

cls
print "Chinesisches Zeichen GOLD"
print "Ĉina simbolo ORO"
clg
color darkred
penwidth 5
p={0,100,100,0, 100,0,200,100, 50,100,150,100,
50,130,150,130,
0,200,200,200,100,100,100,200, 50,160,100,200,
100,200, 150,160}
n=0:xa=10:ya=10
for i = 0 to 7
gosub LINIE
next i
end

LINIE:
x1=xa+p[n+i]
y1=ya+p[n+1+i]
x2=xa+p[n+2+i]
y2=ya+p[n+3+i]
line x1,y1,x2,y2
n=n+3
return
```

*Fenestro por teksto*

*Fenestro por grafikaĵo*



## C. Louis Kervran

### Lia vivo kaj la biologiaj transmutacioj

*Germana fonto: http://www.kervran-info.de/leben.html*
*Tradukis (kun helpo de diligenta samideano) Klaus Friese*

Corentin Louis Kervran naskiĝis la 3-an de marto 1901 en Qimper en Bretonio. Kiel junulo li rimarkis aferojn, kiujn la plenkreskuloj ignoris. Li studis kaj fariĝis fizikista inĝeniero en 1925. El la jaro 1936 konatiĝis esplora laboro de li, en kiu li publikigis, ke la kurento en homa korpo ne obeas al la oma regulo.

Dum la Dua Mondmilito Kevran aktive subtenis la rezistmovadon. 1940 li estis arestita de la Gestapo kaj estis enkarcerigita en Lyon.

De post 1945 li estis gvidanta scienca dungito en francaj ministrejoj. Tie li respondecis la temojn laborsekurecon kaj la protektadon de la loĝantaro kontraŭ radioaktivaj radiadoj. 1966 li emeritiĝis. La franca ŝtato honorigis lin per la kruco de la Honora Legio.

Per sia laboro Kervran deziris pruvi sian sciencan teorion pri la transmutacio de elementoj en biologiaj procedoj. Tiel li volis klarigi plurajn ĝis nun nekompreneblaj faktoj el diversaj sciencaj kampoj (i.a. geologio, medicino, agronomio), ekzemple:

* kial kokinoj povas daŭre demeti ovojn kun normalaj kalkŝeloj, eĉ se la nutraĵo entenas neniun kalkon kaj la teniĝo okazas en senkalka ĉirkaŭaĵo;

* kial en masiva kalkŝtono (kemia: kalcia karbonato) neatendite aperas grandaj peĉoj da magnezia karbonato;

* kial ostorompiĝoj pli rapide resaniĝas, se la paciento glutas ekstrakton de la ekvizeto, kiu estas riĉa de silika acido;

* kial kampoj restas fruktodonaj dum jarcentoj kaj produktadas bonan rikolton, eĉ se oni neniam aldonas la elementojn, kiuj estas forprenitaj per la rikolto (ekzemple manganon).

Kaj kromaj frapantaj ekzemploj:

* Se oni kultivas certajn bakteriojn en senfera nutromedio aldonante iomete da mangana salo, jam post mallonga tempo estiĝas fera oksido.

* Ju malpli da kalko troviĝas en gazona grundo des pli forte kreskiĝas la lekantetoj. Tiuj enhavas grandamase kalkon. De kie ĝi venas?

* Tillandsia usneoides estas planto, kiu kreskas en subtropikaj regionoj sur kupraj telefondratoj kaj vivas nur

de aero kaj pluvo. Cindrigita ĝi enhavas 17 % feron kaj 36% silikan acidon, sed preskaŭ neniun kupron.

* Se grenoj ĝermas en solvaĵo sen kalcio, la junaj plantoj enhavas post kelkaj semajnoj pli ol la trionan kvanton de kalcio komparita kun la kvanto kiun enhavis la grenoj je la komenco.

Kromaj, ege imponaj ekzemploj estas la haŭtdeĵetado de kraboj, la sekiĝo de fruktoj kaj la kapacito de la tervermo.

Tiujn kaj multajn similajn fenomenojn kolektis Kervran kaj kompletiĝis ilin per propraj esploroj. Ekde 1959 li prezentis siajn ekkonojn al la publiko kaj entute skribis naŭ librojn. Neniu de ili aperis en la germana lingvo. 1972 aperis enkonduka resumo de liaj ideoj kaj eksperimentoj (el tri libroj) en la angla lingvo sub la titolo 'Biological Transmutations' (plurfoje publikigita). En la 1960aj jaroj okazis publika debato pri liaj tezoj en Francio, sed ne en Germanio.

1982 Kervran skribis sian lastan libron. Li forpasis la 2-an de februaro 1983.

Por aprezi lian laboron de jardekoj li estis proponita por la Nobelpremio en fiziologio (medicino).

(citaĵo el: C. L. Kervran: Transmutations biologiques et physique moderne. Paris 1982, p. 24)

Impona estas la diverseco de la fakaj kampoj, el kiuj Kervran kolektis faktojn, kiuj ĝis nun oni taksis nenormalaj kaj neklarigeblaj. Laŭ opinio de Kervran oni nur povus klarigi ilin per biologiaj transmutacioj. Li ne subtenas la terminojn 'normala nuklea fuzio' nek 'malvarma fuzio'. Li preferas la esprimon 'trans-mutacio je malalta energio'. Lia labormetodo ĉiam estas rigide scienca. Finfine necesas denove revigligi la diskutadon pri la rezultoj de Kervran, por ke tiuj estu profunde kontrolata rilate al la valideco.

La esploroj de Kervran sekvas longan tradicion pri scienca laboro, kiu estas traktata en liaj libroj. Ili estas karakterizitaj per strikta scienca metodiko. Ne temas pri alkemio aŭ magio.

---

*Ekzemplo por supozita biologia transmutacio:*

$$^{12}_{6}\mathrm{C} + {}^{28}_{14}\mathrm{Si} \longrightarrow {}^{40}_{20}\mathrm{Ca}$$

*laŭ https://www.twintech.ch/aruh/papers5/Transmutation.pdf*

---

# In-Vitro-Viando*

Interesa prelego ĉe YouTube (en la germana lingvo)
Eta resumo en Esperanto de Klaus Friese:

La filozofo kaj aŭtoro Richard David Precht diskutas nian rilaton al bestoj. La prelego okazis kadre de la BIOTOPIA-festivalo en Bavarujo. Se vi elektas la opcion 'aŭtomata traduko', vi ricevas ankaŭ subtitolojn en Esperanto. La prelego ĉefe temas pri la nova metodo produkti artefaritan viandon el bestaj celoj.

Ĉu vi scias, ke ekzistas ĉ. 40 mil leonoj en Afriko, sed en la mondo troviĝas 1 miliardo da porkoj breditaj de homoj? En Eŭropo vivas pli da kokoj vivantaj en mizeraj kondiĉoj ol en la natura medio, 3 miliardo kontraŭ 1,6 miliardoj. La kaŭzo por tiu situacio estas la giganta bezono de viando por homa nutrado. Eĉ se ekzistas kelkaj vegetaranoj kaj veganoj, la bezono daŭre kreskas. Nun ankaŭ en Indio kaj Ĉinio.

La sekvoj de la kreskanta bredado de bestoj estas ekz. pli da likva sterko, kiu malpurigas la subteran akvon. Aliaj sekvoj estas pli da emisioj de metano, pliigita senarbarigo de la pluvarbo k.t.p.

---

** Vikipedio uzas la esprimon „kultivita viando“, tio estas viando produktita per ĉelkultivaĵoj in vitro de bestaj ĉeloj. Ĝi estas speco de ĉelagrikulturo*

La sekvoj de la kreskanta bredado de bestoj estas ekz. pli da likva sterko, kiu malpurigas la subteran akvon. Aliaj sekvoj estas pli da emisioj de metano, pliigita senarbarigo de la pluvarbo k.t.p.

En la jaro 2013 prezentis Mark Post, profesoro en Maastricht, la unuan viandbulon (en hamburgero), kiu estis farita el ĉelkulturoj. Ĝi estis tre multekosta: 300 000 dolaroj! Sed en la jaro 2019 la kostoj malkreskis al nur 40 dolaroj. Do oni povas espekti, ke dum la venontaj jaroj la prezo plue malaltiĝos. La artefarita viando iĝos verŝajne pli malmultekosta ol viando el realaj bestoj.

Jen la pozitivaj efikoj de ĉi tiu tipo de viando-produktado:

Malpli da suferoj por la bestoj, malpli da negativaj sekvoj por la medio kaj la artefarita viando estas verŝajne ankaŭ pli salubra. En Usono, Israelo kaj Nederlando grandaj firmaoj, okupiĝantaj kun artifarita produktado de la viando, spertas grandan kreskon en borsaj valoroj. Se tiuj korporacioj sukcesos, multaj kamparanoj devus perdi sian laboron, ankaŭ la kamparanoj, kiuj uzas organikajn metodojn.

Tamen, la preleganto opinias, ke la nova metodo produkti atrefaritan viandon estas principe bona. Sed estas unu zorgo, kiu povus servi kiel kontraŭ-argumento.

Oni trovas la informon, ke la unuan artefaritan viandbulon estis financita de Sergey Brin, la inventinto de la serĉilo Google. Ĉi tiu informo devas esti rigardata rilate al la juĝo de la eŭropa kortumo de 1997. Tiam la juĝistoj decidis ke ne estu patentoj pri vivo, sed patentoj pri procezoj estas permesataj.

Precht pledas ke la procezoj por la artefarita produktado de viando ne devus esti patentitaj. Ĉi tio estas la sola maniero malhelpi grandan korporacion monopoligi nian nutraĵon.

---

*Fonto : https://www.youtube.com/watch?v=CsGJwO-flYc (17.09.2019)*

***Kultivita viando** estas potenciala kontribuonto al la solvo de grandaj tutteraj problemoj de la naturmediaj efikoj de viando-produktado, besta bonfarto, nutra sekureco kaj homa sano.*

*La produktada procezo evoluas konstante, antaŭenigata de pluraj firmaoj kaj institucioj de esploro kaj evoluigo. La evoluigo de kultivita viando kondukis al debatoj pri rilataj etikaj, sanrilataj, naturmediaj, kulturaj kaj ekonomiaj demandoj.*

*(El Vikipedio)*

Klaus Friese

# Esperanto kaj la estonteco

Eta kontribuo al la diskurso pri la „movado“



Mi legis artikolon de Robert Nielsen ‚Kiel junigi la movadon‘[1]. Jen miaj pensoj:

Jes, la t.n. tradicia Esperanto-movado evidente ŝrumpas kaj ne estas facile atingi la multajn aliajn homojn, kiuj ankaŭ uzas Esperanton, sed ŝajne „nur“ en la reto. Do, estas bona ideo serĉi ilin per „Amikumu“[2], kiel Robert priskribis. Sed verŝajne tio nur povas aldoni etan guton al la tradiciaj grupoj. Pli verŝajne estas, ke tie la ŝrumpado ne estas haltigita. Tamen mi pensas ke Esperanto supervivos.

Ja, la junuloj ofte ne volas partopreni la tradiciajn kunvenojn. Sed kiu nuntempe estas juna, post kelka tempo ankaŭ maljuniĝos. Nur ne subtaksu la

„grizharulojn“! Tiu grupo sendube kreskos kaj en tiu grupo certe troviĝos sufiĉe da homoj, kiuj rememoras la junecon, kiam ili traktis Esperanton, eventuale nur supraĵe. Sed nun, kiel maljunulo, oni ja havas pli da tempo trakti la aferon pli detale.

Antaŭ kelkaj jaroj mi korespondis kun maljuna samideano el Japanio. Mi demandis lin, ĉu li sukcese konvinkis siajn infanojn pri Esperanto. Li amuziĝis pro tiu demando kaj respondis „Ne, mi neniam postulis, ke miaj infanoj lernas Esperanton. Ili ja devas koncentriĝi al la lernejo. Tie necesas lerni natursciencojn kaj, kompreneble, la Anglan. Iam ili ankaŭ maljuniĝos kaj tiam restos sufiĉe da tempo por studi Esperanton. Mi mem ankaŭ faris tion.“

Mia japana korespondamiko estas bona modelo por Esperantujo. Estas klare, mi ankaŭ preferus, se la plimulto de niaj junuloj lernu Esperanton. Sed tio certe ne estas realigebla. Grave estas, ke ĉiu junulo iam ricevas informojn pri Esperanto, minimume pri la ideo de Esperanto. Tial estas ankaŭ tre bona por la t.n. Esperanto-movado se multaj junuloj partoprenas la kursojn ĉe Duolingo, kvankam plejofte nur supraĵe. Mi havas grandan konfidon en la ideo de Esperanto. Se tiu ideo iam infektas homon, ne gravas, kiam li vere komencas studi la Internacian Lingvon. Nur gravas ke li aŭ ŝi tiam trovos sufiĉe da ofertoj.

Tial ankaŭ gravas, ke la nunaj aktivaj Esperantistoj preparas multflankan materialon por lernado, por legado, por distriĝo k.t.p. Ne gravas, ke ĉiu Esperantisto apartenas al iu „tradicia“ klubo aŭ asocio. Sed estus tre bone, se multaj aktivaj Esperantistoj bone kunlaboras.

Tio eblas ekz. Per Esperanta Kunfarejo [3]

---


*1*
*https://www.liberafolio.org/2018/05/28/kiel-junigi-la-movadon/*

*2*
***Amikumu** estas plursistema aplikaĵo por saĝtelefonoj (Android kaj iOS), per kiu oni povas trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn aŭ parolantojn de aliaj lingvoj. Ĝi estas la sola socia reto kies dua lingvo estas Esperanto. (laŭ Vikipedio)*

*3*
*http://kunfarejo.frali.bplaced.net/*

# Koro ĉe la plafono





Estis belega somera mateno kaj ni vizitis diservon en nia loka preĝejo. Poste ni iris hejmen. Tiutempe nia loĝĉambro ne estis hejmeca ĉar la renovigado ankoraŭ ne estis finita. Tial ni serĉis pli bonan ĉambron en la unua etaĝo kaj iomete babilis pri la diservo. La kurtenoj preskaŭ tute mallumigis la ĉambron, sed subite mia edzino rimarkis, ke la SINJORO evidente kunaŭskultis. Ŝi ekvidis sur la plafono etan helan koron! Tuj ŝi fotis tiun fenomenon dufoje. Unu bildo montras eĉ la kurtenojn, sed oni ne povas klarigi ekzakte kiel la koro aperis. Do, verŝajne estis simple eta miraklo, ĉu ne?

*Klaus Friese*

Liesel Kahl

## Du nuptaj tagoj kaj kio okazis antaŭ ili

*(Esperantigis Klaus Friese)*

"Holger, sidiĝu, mi devas diri al vi ion gravan", anoncas Bruno sidante sur la seĝo en mia iama infanĉambro.

"Vi iĝos avo!"

Mia patro perplekse demandas: "Kaj nun?"

"Ni geedziĝos!"

Mi silente staras apude kaj diras neniun vorton. Mi ja scias la reagon de miaj gepatroj jam antaŭe. Tro juna, tro frua, neniom da mono, neniu loĝejo, unue estu plenaĝa! Mi ĵus fariĝis 19-jaraĝa kaj en somero eklaboris kiel stenografiistino. Bruno kaj mi restas obstinaj. Ni jam pripensis, ke ni povus enloĝi la malplenan ĉambron en la subtegmento. Ĉio alia ordiĝos poste.

Tiam ĉio pasas tre rapide. La dato por la geedziĝo estas fiksata. Kun mia patrino mi ekiras serĉi edziĝan robon. Por la registra oficejo estas gratanta kostumo de la marko Chanel en 'kokpieda' deszajno kun helverdaj kaj flavgrizaj kvadratoj.

"Tio estas bona por dimanĉoj. Post la nupto vi ne plu havos monon por bona vestaĵo", opinias mia patrino.

Por la geedziĝa ceremonio en la kirko mi trovas mallongan robon kun blanka punktgarnaĵo, kiu lasas la dorson libera. Super tio mi portas plaĉan mantelon en la stilo de la empiro. Tute ŝika! Post la nupto mi nur malofte portas la 'Chanel'-kostumon. Esti tro varma kaj gratanta. Sed mian blankan robon, la 'blankan sonĝon', mi surmetis longe: dum mildaj someraj noktoj kun nudaj ŝultroj, dum pli malvarmaj noktoj kun mantelo.

La festo estas rapide organizata. Ĝi devas okazi kiel ĉiuj antaŭaj familiaj festoj en nia strato, la 'Longa Vojo' en la domo numero 18. La listo de la gastoj estas antaŭdifinita: gepatroj, geavoj, gefratoj, geonkloj, gekuzoj kun anaroj, la plej proksimaj najbaroj kaj, laŭ nia deziro, ankaŭ unu amiko.

Tri semajnojn antaŭ la planita nuptotago mi perdis mian infanon. Ankoraŭ ĉe la lito en malsanulejo miaj gepatroj premegas min:

"Nun ni povas ja prokrasti la geedziĝon kaj atendi ĝis via maturiĝo".

Sed Bruno kaj mi estas enamiĝintaj. Ni ne volas kaŝi tiun amon kaj insistas pri geedziĝo kaj propra apartamento. Miaj gepatroj cedas finfine.

Do, la du nupto-tagoj pasas kiel planite, la ceremonio en la preĝejo kaj la oficiala geedziĝo en la registra oficejo. Nur la vespero antaŭ la geedziĝo estas draste limigita. Kia feliĉo! Tiamaniere ni ne bezonas zorgi pri amaso da rompita porcelano kaj longedaŭra nokto kun ebriaj gastoj. Dum la 1960-aj jaroj tio estas kutimo en nia regiono, diboĉa trinkado, kaj poste forigo de grandaj kvantoj da rubo!

Je noktomezo ĉio estas majstrita kaj la estonta edziĝa paro malaperas al la komuna lito en la supra etaĝo, dum mia patro estas ŝokita. Mia patrino provas trankviligi lin. Morgaŭ ja estos la oficiala ceremonio en la registra oficejo. Nun nur estas unu nokto antaŭe.

Mi ne povas rememori la edziniĝon en la registra oficejo. Ĝi okazas en najbara vilaĝo en simpla ĉambro. La du patroj estas la nuptoatestantoj. La alparolo de la oficialulo estas senpasia, sobra kiel la ĉambro. Sed poste mi liberiĝis de mia gepatra domo kaj ne plu estos ordonoj de la gepatroj! Mi rajtas tradanci la noktojn, ĉar nun Bruno estas mia oficiala zorganto!

La mateno antaŭ la edziniĝo en la preĝejo estas hasta. Lastaj preparoj en la kuirejo. Loĝĉambro kaj manĝoĉambro devas esti senmebligitaj. Aranĝi tablojn kaj seĝojn. Kaj kontroli ĉu ĉio estas pripensata. Ne forgesu la viziton ĉe la frizisto por ĉiuj aktorinoj. Miaj mallongaj haroj estas kombitaj supren kun tunoj da


harfortigilo. Krome ĉio estas betonigita per simila kvanto da harlako. Mi aspektas kiel mia propra avino!

Alvenante hejmen mi furioze ploras kaj brosas per ĉiaj fortoj la betonan blokon ĝis la haroj estas denove glataj kaj montras la kutiman Courrèges stilon. Nun ploras la frizistino. Ŝi havas problemojn fiksi la mallongan vualon kaj la mirtokronon sur la nun glataj haroj. Mia kuzino Berta, ŝi estas trejnita floristino, zorgas pri la floraj ornamaĵoj, kiuj estas la pordokrono, la tablo-ornamaĵo, la ruĝblanka bukedo por la novedzino kaj la mirtokrono, kiu ne devas esti fermita, ĉar mi ja ne plu estas virgulino.

Tiam ĉiu ekas por la aŭtoveturado - la geedza paro antaŭen - al la proksima preĝejo Sankta Johano. La solena orgena muziko, la abunda flora ornamaĵo, la odoro de fumo pro la kandeloj, la alparolo de nia pastoro Bernd Lingen, la interŝanĝo de la ringoj - ĉio rapide preteriras kiel rapide moviĝanta filmo. Nur la edziĝformulo 'Ĝis la morto disigos vin' restas en mia memoro. Ĉio rapidas preter ni kiel rapide moviĝanta filmo. Por ni neimagebla se iam estos alie.

Du infanoj disĵetas florfoliojn sur nian mallongan vojon de la preĝejo al la aŭto. Ni ŝvebas kvazaŭ sur rozkolora nubo kaj ne supozas, ke nia estonta vojo ankaŭ kondukos nin super dornaĵojn kaj stumbloŝtonojn.

Survoje hejmen infanoj staras apud la strato trudeme petantaj etajn donacojn. Ili baras la traveturadon kaj nur tralasas nin, post kiam ni verŝas pluvon da bombonoj al ili.



La plenkreskuloj ricevas brandon kaj ni mansvingas ridetante favorplene el la fundo de la aŭto dum la tuta veturado. Ĉe la Longa Vojo la bankeda tablo estas jam preparita: nupto-supo en grandaj bovloj, pladoj kun tri specoj de rostaĵo, bovloj kun ĉiuj legomoj, mallongaj tostoj de la patroj. Ekzistas unu el malmultaj fotoj, kiu montras min kun deŝovita vualo tamen feliĉa meze de la bankedo.

Poste la tabloj kaj la seĝoj estas forpuŝataj kaj ni kiel nupta paro komencas la dancadon. Bruno, kiu estas muzike tute sentalenta, daŭre surpaŝas miajn piedojn. Tiuj ĉiuokaze jam neelteneble doloras pro la nekutime mallarĝaj altaj ŝuoj. Ni ambaŭ ĝojas, ke nia oficiala komenca danco finiĝas kaj nun la dancejo estas libera por ĉiuj.



Je noktomezo okazas ankoraŭ la tiel nomata 'vualo-danco'. La nupta vualo estas entranĉita. Ĉiuj gastoj ĉirkaŭas la dancantan edziĝparon. Kiam la muziko haltas ili saltas al mi por kapti pecon de la vualo. Bruno firme ĉirkaŭpremas la nuptan kronon, kiu estas oblikve fiksita sur mia hararo. Li permesas deŝiri la vualopecojn, sed li klopodas malhelpi la eltiron de la haroj. Poste ni ŝanĝas la kapvestaĵojn - Bruno ricevas kvastoĉapon kaj mi havas nun kaptukon el telertukoj. Iu ĵetas grandan supbovlon sur la plafonon kaj ni devas balai la pecojn. Tiu agado estas daŭre malhelpata ĉar la gastoj ne ĉesas forpuŝi la pecojn al ĉiuj anguloj de la ĉambreto.

Tiam mi rajtas finfine ĵeti la nuptan florbukedon trans mian kapon. Mia samaĝa kuzino Elke kaptas ĝin. Ŝi estas nun konsiderata kiel la sekvanta novedzino. Kaj, vere, ŝi edziniĝas post mallonga tempo. Bruno kaj mi malaperas en la nuptan dormoĉambron de la subtegmento.

Ni ankoraŭ dum mallonga tempo aŭdas la petolan tumulton sub ni kaj esperas ke tio kaŝas la nun oficiale permesitajn sonojn en nia ĉambro kaj ekdormas firme kaj sensonĝe.

Kiam okazis ĉio tio?

Ni ne plu ekzakte scias tion, iam inter 16-a kaj 18-a novembro 1967!

Jam frue ni mislokis nian ateston pri geedziĝo. Poste mi ĝin trovis en la trezoro ĉe la banko kaj metis ĝin en keston de la skribtablo. Post kelkaj jaroj mi denove trovis ĝin dum purigado sed tuj mi denove mislokis ĝin ie en la domo. La 17-a aŭ la 18-a novembro restis en nia memoro sed ni ne scias ĉu tiam estis la ceremonio en la kirko aŭ en la registra oficejo. Tio kuŝas en la mallumo de la historio.

Ni ambaŭ regule ĉiam forgesas la daton de nia nupto - ĝi ne estas grava por ni. Ekzistas aliaj datoj, kiujn ni enmemorigis kiel indaj por dankemo.

# Filozofio en vintro



Post longa tempo denove neĝis ĉe ni en Hamburgo. La efiko de la neĝo estas bona trankvileco, ĉar neĝo forglutas la bruon. Dum peza irado tra la neĝo ĉiu paŝo grincas.Kaj subite, mi ne scias kial, ekaperas stranga penso en mia kapo. Pri tio mi ĝis nun neniam pripensis. Temas pri demando por kiu mi ne trovas respondon.

Sed feliĉe ekzistas ja ChatGPT. Al tiu artefarita intelekto mi donis mian demandon kaj tuj ricevis respondon. Sed ĉu mi nun vere estas pli saĝa?

Sed legu mem!

# La demando pri Dio, la kreinto

**Tasko por ChatGPT** *(Esperantigis Klaus Friese)*
05/12/2023

Multaj religioj rigardas Dion kiel la kreinton de la mondo kaj de ĉio. Kiuj pensoj troviĝas pri la demando, kiel la kreinto mem ekestiĝis? Krome estus interese pensi pri tio, kion faris la kreinto antaŭ la ago de la kreaĵo. Al tiuj demandoj kompilu pensojn kaj ideojn de famaj teologoj kaj filozofoj!

**ChatGPT:**

La demando pri la ekestiĝo de la kreinto kaj siaj aktivecoj antaŭ la ago de la kreaĵo estas profunda kaj kompleksa temo. Tion diskutis multaj teologoj kaj filozofoj dum la tuta historio. Jen kelkaj konsideroj de famaj pensuloj:

**Thomas von Aquin (1225-1274):**

Thomas von Aquin estis teologo kaj filozofo en la mezepoko. Li argumentis ke Dio ekzistadas ekster la tempo. Tial la demando pri la ekestiĝo de dio estas sen senco, ĉar tempo kaj spaco nur ekestiĝis dum la kreado.

**Augustinus von Hippo (354-430):**

Augustinus, frua kristana teologo, emfazis ke Dio ekzistas ekster nia homa imago pri tempo. Li argumentis ke la tempo estas kreaĵo de Dio kaj tial ne povas esti uzata rilate al Dio mem.

**Immanuel Kant (1724-1804):**

Kant, grava filozofo en la epoko de klerismo, argumentis, ke la homa racio atingas siajn limojn kiam temas pri la naturo de Dio. Li emfazis ke ni ne povas akiri certajn sciojn pri tiaj metafizikaj demandoj.

**Gottfried Wilhelm Leibniz (1646-1716):**

Leibniz proponis ke la ekzisto de dio estis necesa ĉar en Dio estas enkarnigita la esenco de supera perfekteco. La demando pri la ekestiĝo de Dio do ne estas necesa, ĉar Dio ĉiam ekzistis.

**Martin Heidegger (1889-1976):**

La ekzistencialista filozofo Heidegger emfazis, ke la demando pri la 'ekzistado' devus esti en la fokuso de filozofiaj pensoj. Laŭ Heidegger la demando pri la ekestiĝo de Dio povus esti rigardata kiel provo kompreni la 'ekzistadon' en maniero kiu ne taŭgas por homaj raciaj ŝablonoj.

**Blaise Pascal (1623-1662):**

Pascal argumentis, ke la ekzistado de Dio troviĝas ekster la homa racio.

Tiuj pensuloj havas diversajn alirojn kaj perspektivojn. Sed multaj el ili emfazas, ke la demando pri la ekestiĝo de Dio eble ne estas sencoplena aŭ kuŝas ekster la atingeblo de homa komprenemo. Grave estas konsideri ke filozofiaj opinioj pri tiuj demandoj estas forte influitaj de la respektivaj religiaj, kulturaj kaj intelektaj tradicioj.

---

***Tomaso de Akvino*** *estis itala dominikano, influhava filozofo, grava katolika teologo kaj pastro. Li estas honorita kiel sanktulo en la Romkatolika Eklezio.*

***Augustinus*** *von Hippo estis naskita nordafrika romia provinco. Li estis romia episkopo kaj doktoro de la eklezio.*

***Immanuel Kant*** *estis germana filozofo kaj metafizikisto el Kenigsbergo. Li ellaboris la filozofian bazon de la nova scienca mondbildo.*

***Gottfried Wilhelm Leibniz*** *estis germana filozofo, matematikisto kaj multfakulo. Li okupis elstaran lokon kaj en la historio de matematiko kaj en la historio de filozofio.*

***Martin Heidegger*** *estis germana filozofo, kiu ĉefe okupiĝis pri ontologio, estetiko, filozofio de teknologio kaj fenomenologio.*

***Blaise Pascal*** *estis franca sciencisto. Li okupiĝis precipe pri filozofio, fiziko kaj matematiko.*

……………………………………[el diversaj Vikipediaj paĝoj]

# Anĝelo nomata Hans-Dieter

*Priskribo de filmo  (de Klaus Friese)*

*

*„Ein Engel names Hans-Dieter“* estas amuza filmo, kiun vi povas spekti per YouTube. Ĝi prezentiĝas en la germana lingvo sed eblas montri aŭtomatan tradukon en multaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto.

La aktoro Fritz Wepper pozas kiel la fabrikposedanto Hans-Dieter Anhäuser. Li estas abomena homo kiu trompas sian edzinon Hilde kun belplena blondulino. Krome li tute neklektas siajn tri infanojn. Dum la tempo antaŭ Kristnasko li ĉikanas siajn dungitojn kaj ordonas al ili kromlaboron sen salajro.

---

**Bildo de Craiyon*

Unu tagon la dua filo Benni promenas sur kristnaska merkato por kapti fotojn. Dum tio li hazarde vidas sian patron, kiu forlasas fremdan loĝejon.

Sur la balkono aperas virino en nedeca vestaĵo kaj vokas ion al li. La adiaŭa sceno montras, ke li klare estas en intima rilato kun ŝi. Ĝuste tion filmas Benni.

Li uzas tiun filmon por ricevi subtenon de lia patro kontraŭ la  patrino, kiu devigas sian filon regule iri al la piano-lecionoj. Sed Benni preferus piedpilkon. Hans-Dieter malaprobas tiun provon de ĉantaĝo kaj minacas ke Benni ne ricevos la novan komputilon kiel Kristnaska donaco.

La filino Sonja multfoje provas paroli kun sia patro. Ŝi ja volas forlasi la lernejon por komenci karieron kiel modelon. Sed kiel kutime ŝia patro ne havas tempon por paroli.

Ankaŭ la rilato kun la unua filo Manfred ne estas bona. Li  kunlaboras en la firmao kaj inventis novan produkton, sed la patro nur havas malbonan opinion pri tio. Ĉiuj proponoj de la filo por helpi trankviligi la ribelantajn dungitojn estas vanaj. Ili ribelas pro la nehomaj ordonoj de la ĉefo sed samtempe timas perdi la laboron.

La firmao havas grandajn financajn problemojn. Tial Hans-Dieter planas vendi la fabrikon al la japanoj. Li ne

havas tempon diskuti tion kun la dungitoj kaj rapide kuras al la liverkamiono de la firmao por rapide veni al la kunveno kun la japanoj. Ĝuste kiam li volas eniri la veturilon, venas almozulo kaj petas monon. Li ne havas ŝancon kaj estas bruske malakceptita.

En la kamiono Hans-Dieter stirante daŭre uzas sian smartfonon kaj krome lasas sin distri per preterpasanta alia veturilo. Sur ties postveturilo staras malmulte vestita knabino, kiu pozas kiel anĝelo kun longaj flugiloj, verŝajne por reklamaj celoj. Hans-Dieter rigardas flanken kaj kaŭzas akcidenton. La kamiono renversiĝas sur sia flanko.

Grimpante el la aŭto li vidas ke ene kuŝas mortinto kun sango sur la kapo. Sed li ne komprenas, ke tiu homo estas li. Tuj poste li miras ke li nun troviĝas ĉe sia propra entombigo.

Li povas libere iri al la partoprenantoj kaj inter ili, sed neniam vidas lin. Li aŭdas ĉion, sed kiam li mem parolas, neniu reagas, ĉar neniu aŭdas ion. La funebra komunumo ne vere funebras. Evidentiĝas ke ĉiu, eĉ lia edzino, fakte ĝojas ke Hans-Dieter ne plu estas inter ili.

Tute konfuzita li iras al la granda ponto kaj rigardas la riveron. Li konfesas al si mem, ke li vere bedaŭras ĉion. Sed li ne volas plue vagadi tra la mondo kiel Zombio. Tial li decidas sinmortigi nun. En tiu momento aperas

„Avĉjo“, lia forpasinta bopatro sidante en kaleŝo. Li klarigas ke Hans-Dieter povas eviti iri al la infero se li sukcesas farigi la tutan familion feliĉa. Sed tio devas okazi antaŭ Kristnasko.

Hans-Dieter ne scias kiel fari tion. Malespere li nun saltas de la ponto akompanata per laŭta tondro. Li sinkas en la akvo kaj tuj poste vekiĝas en hospitala lito.

Nekredeme li iras al la koridoro demandante ĉu ĉi tie estas la ĉielo aŭ la infero. La flegistino informas lin ke post la akcidento li estis pli ol unu semajno en komato. Tiamaniere Hans-Dieter komprenas ke li ne mortis kaj ke li nur sonĝis. Sed nun kaptas lin nova maltrankvileco. Hodiaŭ estas la deka de decembro. Kiel li povas sukcese plenumi la taskon feliĉigi la tutan familion ankoraŭ antaŭ Kristnasko?

Hans-Dieter rapidegas la sia domo. Li eniras la loĝĉambron nerimarkite kaj subaŭskultas konversacion inter lia edzino kaj la infanoj. La situacio en la firmao estas katastrofa, estas minaco de bankroto. Benni interrompas la paroladon prezentante filmon. Estas sceno en kiu lia patro kisas sian amatinon.

La edzino Hilde estas ŝokita. Ŝi ne akceptas la promeson de lia edzo kiu asertas esti nova homo, kiu volas fari ĉion ĝustan denove. Ŝi ne volas vidi lin plu kaj forsendas lin.

Seniluziigita li forlasas sian domon. Tamen li tenas sian decidon feliĉigi ĉiujn ĝustatempe antaŭ Kristnasko.

Survoje li renkontas la almozulon, kiun li iam malakceptis tre bruske. Hodiaŭ li malavare donas al li cent Eŭrojn. Li volas ja esti bona homo nun. Tial li ankaŭ subtenas la ideojn de sia unua filo kaj lasas lin gvidi la firmaon.

Por ebligi feliĉon al la edzino, Hans-Dieter kontaktas la najbaron Gottlieb, kiu jam delonge sekrete amikiĝis kun Hilde. Li eĉ instigas Gottlieb en siaj klopodoj gajni la amon de Hilde. Ankaŭ Benni nun rajtas anstataŭigi la piano-lecionojn per piedpilko. Sonja nun povas komenci sian karieron en la moda mondo kiel modelo kaj la bopatrino ricevas finfine la eblecon vojaĝi tra la mondo per krozilŝipo.

Bedaŭrinde ne eblas malfermi la trezoron de „Avĉjo“. Do, la financaj problemoj de la firmao restas. Per hazardo Hans-Dieter finfine trovas la sekretan numeron por la trezoro. Li malfermas ĝin kaj vidas ĝin plena de oro. Sed tie estas nur falsaj blokoj faritaj el plumbo, stranga ŝerco de la pasinta bopatro.

Hans-Dieter denove iras al la granda ponto. Li ne sukcesis ŝanĝi la situacion en sia familio. Denove tute seniluziigita li decidas sinmortigi. Ĉifoje la almozulo,

vestita kiel Santa Claus, malhelpas tion. Li donas la konsilon hejmeniri ĉar ĉio estos bona.

Jes, estas miraklo. La tuta familio kunvenas kaj bedaŭras lian foreston. „Ne estas Kristnasko sen Paĉjo“, diras Manfred, la unua filo, kaj decidas serĉi sian patron. En tiu momento aŭdiĝas la porda sonorilo. La tuta laborantaro de la firmao proklamas, ke ili estas preta savi la firmaon. La salajro devas esti pagitaj post la sekva foiro.

Kune kun la loĝantaro alvenas Hans-Dieter. Ĉifoje li estas vestita kiel Santa Claus. La familio ĝoje bonvenigas lin kaj Kristnasko estas savita.

---

*Tiu komedio enhavas ideojn el la kristnaska fabelo de Charles Dickens ‚A Chrismas Carol‘ el la jaro 1843, en kiu la avarulo Ebenezer Scrooge iĝas aminda persono. Verŝajne kroma influo venis de la fama filmo ‚It‘s a wonderful life’  el la jaro 1946, en kiu James Steward ludis la ĉefan rolon.*

---

# Trompita

 *

Kiel povis ĉi tio okazi al mi?

Antaŭ ne longe mi trovis ĉe YouTube filmon pri prezentado de fama kanto de Freddy Mercury.

Sub la video-fenestro estis skribite:

---

*'I Want to Break Free' (Queen) Performed In North Korea*

*Very rare footage of the North Korean girl group 'Moranbong Band' and The North Korean Military Chorus.*

---

** Bildo de Craiyon*

La Esperanta titolo certe estus ‚Mi volas liberiĝi‘. Ĉu vere ĝi estas prezentita en Norda Koreio? La dua frazo klarigas tion:

Tre rara filmaĵo de la Nordkorea knabingrupo "Moranbong Band" kaj La Nordkorea Armea koruso.

Mi miris ke io tia ekzistas en Norda Koreio. La Moranbong-bandon mi jam vidis iam. Tiu virina bando estas tre fama en Norda Koreio. Sed ke ili prezentas nun eĉ faman pop-kanton en la angla lingvo, tio estas surprizo.

Mi eĉ pli miris pro la vira koruso, kiu staris en la malantaŭo. Tie kolektiĝis certe pli ol cent soldatoj, plejparte maljunuloj. Ili portis la tipajn militistajn ĉapojn, kiuj aspektas tiel kiel ni konas el Ruslando. Kaj krome estis tie ankaŭ la orkestro kun blovinstrumentoj kaj violonoj. Ĉio estis vere tre impresa.

La filmo komenciĝas per turniĝo de la kamerao  al la salutantaj soldatoj kaj al la giganta flago de Norda Koreio. Kompreneble ankaŭ Kim, Jon-un, la  Prezidanto de la Ŝtataj Aferoj-Komisiono de la KDPR (Korea Demokratia Popola Respubliko), aperas sur la granda ekrano. Li estas ankoraŭ la ĉefa komandanto de la nordkoreana polpola armeo. Li sidas meze de la publiko kune kun sia edzino.

Post koncertsimila enkonduko, la ses blanke vestitaj Moranbong-virinoj komencas kanti: "Dud, dud, k.t.p."

Tiam oni vidas la soldatoj de la koruso malfermante siajn buŝojn vaste kaj nun aŭdiĝas la longdaŭra "Ah". Intertempe oni kelkfoje vidas gitaron en granda bildo. Kaj tiam manklakas la unua vico de la spektantoj laŭ la takto. Multaj de ili portas  multajn medalojn sur la brusto.

Ankaŭ Kim, Jon-un manklakas. La kamerao movas tra la publiko kaj montras kelkajn spektantojn per granda bildo. Oni povas vidi la movojn de la buŝoj. Evidentiĝas ke ili laŭte kunkantas. La homoj eĉ kantas *“God knows“* (Dio scias)!

En la malantaŭo prezentiĝas granda ekrano montrante la sunon sub la nuboj. Tiam subite aperas en grandega formato a bildo la prezidanto vestita per nigra, longa mantelo, kiu flirtas tien kaj reen en la vento. Je la fino de tiu sceno Kim afable ridetas.

La kantado estas tute en la angla lingvo. La muzika prezentado vere aŭdiĝas bone.

Jes, mi estis impresita, tiel ke mi devis informi ankaŭ aliajn pri tiu muzika evento.

La ekrano de mia komputilo montris ankaŭ bildojn de aliaj videoj je la maldekstra flanko. Mi estis nun tre

scivolema kaj klakis sur la bildo pri infana koruso el Norda Koreio.

Mi legis:

---

*„Rammstein's Mutter Performed by North Korean Children's Choir.“*

---

Tio signifas ke temas pri la kanto ‚Mutter‘ (Patrino) de la germana pop-bando Rammstein.

Ĉu tio povas esti la vero? Unue oni vidis kelkajn knabojn kun mallongaj hararoj kaj ruĝaj koltukoj. Ili prezentis ruĝajn flagojn kaj blovis trombonojn.

Poste montriĝis granda koruso kun knabinoj. La prezidanto Kim denove sidi en la publiko kun ĉifoje ĉefe junaj gastoj vestitaj per blankaj ĉemizoj kaj ruĝaj koltukoj.

La piano akompanis la koruson, kiu komencis kanti en la germana lingvo. La muzika prezentado denove estis bona.
Kaj mia entuziasmo nur malfortiĝis, kiam mia filo klarigis ĉion profunde.

„Ha, ha! Vi estis trompita! Ĉio estas nur falsa!“

Mi estis konsternita. Mi devis lerni, ke iu, kiu sin nomas Lars von Retriever, estas fama pro tiaj videoj. Li miksas muzikon de iu origina fonto kun bildoj, kiujn li prenas de tute alia filmo. Tiel li ekzemple prenis la kantadon de rusa infankoruso kaj enmetis ĝin en la filmon de infankoruso el Norda Koreio.

Nun, post tiu klarigo mi pli atentas la lipmovojn de la kantistoj kaj rimarkas, ke ne ĉio estas sinkronigita.

Sed, respekto! La falsaĵoj estas vere bone faritaj!

La informoj de la YouTube-kanalo jam klarigas tion:

*„Important note: this is a comedy channel so don't take my videos too seriously, please.“*

Grava indiko: Tio estas komedia kanalo, tial ne prenu miajn videojn tro serioze, mi petas.

*Klaus Friese*

Hans-Peter Schwabe



# Vera historio el la 50-aj jaroj

*Fonto: Bergedorfer Bissanzeiger Nr. 53 (12/2019, p. 33)*
*Esperantigis Klaus Friese*

---

Ni estis ĉirkaŭ ok ĝis naŭ jaroj aĝaj, kompreneble el la Töpfertwiete[1]. Tiu strato kondukis de la Sachsentor[2] ĝis Brookdeich[3]. Tie kompreneble ankaŭ troviĝis la Brookwetter[4] kaj tie estas nia celata areo.

Mi kreskis en n-ro 19. Nia najbaro estis Paul Ramdor kun sia nutraĵvendejo. Tre konata nomo.

Kaj kompreneble en tiu fama strato ankaŭ s-ro Kruggel havas sian butikon por materialoj, kiujn oni bezonas por fiŝkaptado. Ekzakte je la alia flanko de ni komenciĝis la imperio de la firmao Möbel Marks. Tie estis la enira pordo kaj antaŭe estis la metiejo por mebloj. Malgrandaj mebloj tiam estis transportitaj for per skota ĉaro.

Io, kio tre gravas, estas la Wetter[5] . Iam mi enuigite promenas trans la strato kaj subite vidas ke estis granda homamaso sur la ponto al la Brookdeich. La infanoj de la najbarejo evidente eltrovis ion kio ankaŭ vekis mian scivolon. Do ek al la loko!

Mi tuj ricevis la necesajn informojn. Tie – tie – tie antaŭ la akvobaraĵo naĝis karpo. Kaj kia giganto! Do, kion fari nun? La ideoj preskaŭ eksplodis en la kapo.

Retkaptilon neniu havas. Ankaŭ ne parolu pri reto. Nu, ja, tiam ni mem devas fari ion. Kiu kunlaboras? Kiel ĉiam en tiaj malfacilaj situacioj: NENIU.

Tial estis mi, kiu saltis super la balustradon al la korto de Töpferhof[6] n-ro 11. Supre staris miaj tiel nomataj adorantoj, ĉar ili sciis, ke nun devas okazi io. Estis somero. Do, for kun la ŝuoj kaj ŝtrumpoj. Ni kiel knaboj ja ĉiuj portas mallongajn pantalonojn.

Do, unue malsekigi la piedojn kaj per la okuloj kontroli la grundon, ĉu tie estas iuj pintaj ŝtonoj aŭ ladskatoloj. Ja, ankaŭ tiutempe la homoj ofte tre facile forigis la rubaĵon. Kaj por esti sekura ankaŭ gravis atenti la ĉinan lankruran krabon, ĉar tiuj bestoj ja estis ĉie.

Mi kuraĝis kaj mi faris. Malrapide mi unue palpserĉis la grundon por trovi ajnajn akrajn objektojn. Ne estis problemoj. Kaj nun estis la starto. Malrapide mi

ŝtelproksimiĝis. Tiam mi kaptis ĝin. Vere, la karpo estis iomete lama, tamen ankoraŭ tro rapide por miaj manoj. Tial sekvis nova atako. Sed estis la sama situacio. Kion mi povas diri. Ĝi estis tre, tre glitiga. Do, denove.

Supre, sur la ponto ĉiuj kompreneble estis ekscitita ĉu mi vere sukcese kaptus la karpon per miaj manoj. Tial mi provis denove kaj denove. Sed ĉiam ĝi forglitis de mi. Mi riskis mallongan vidon al la ponto sed tie ĉie estis for.

Anstataŭe staris tie viro en malhelblua mantelo, sur la manikoj unu aŭ du strikoj kaj surkape polic-ĉako. Li prezentis al mi sian montrofingron, kiu signifis ‚Iru ĉi tien!‘. Simple dirite, li estis policisto. Nu, estis malfacila afero simple forkuri. Mi estis bona forkuranto. Sed mi timis ke iu certe perfidus min. Verŝajne pli bone estus, simple obei.

Tuj kapto en la kolo. Kaj la alia mano firme tenis la ĉemizon kaj la puloveron. „Vi en viaj junaj estas implikita en ŝtelĉasado de fiŝoj!“, li diris en rigida oficiala lingvo. Tio havis sian efikon. Li volis kunporti min al la policejo en la Wentorfer Straße[7]. Denunco pro ŝtelĉadado. Ho, Dio mia, ho ve!

„Kie vi loĝas?“ Severaj vortoj.

Timo estis en mia kolo.

„Ti antaŭe, ĉe la angulo. N-ro 19.“

„Bone, ni unue iru tien.“

Kaj tiel mi en miaj junaj jaroj estis forportita tra la Töpfertwiete. Dekstre kaj maldekstre singardeme moviĝis la kurtenoj. Kie tie nur observis min?


Ni alvenis je n-ro 19. Ek al la ŝtuparo kaj mia gardisto de ordo premis la sonorilon. Mia patrino kompreneble estis tie kaj malfermis la pordon. La gardanto de la leĝo parolis ion de ŝtelĉasado kaj ‚Batŝ, batŝ‘ klakas la unuaj vangofrapoj de Panjo. La gardanto de la leĝo ŝajne estis tre impresita pro tia ago. Kaj post mi tiel ricevis ĉiujn insultojn de la mondo, li verŝajne kompatis min. Kaj li ne plu insistis pri raportado. Li nur lasis min al mia sorto.

Tio, kio poste okazis, estis simple terura. Mi ne volas priskribi tion. La pli maljunaj legantoj scias, pri kio temas. Krome mi devis resti en ĉambra enfermo. Kaj mi eĉ memoras la vortojn ‚eduka hejmo‘.

Jes, tiel estis la situacio – TIUTEMPE -

---

*Mapo pri la stratoj sur la sekvanta paĝo:*




*Mapo de OpenStreepMap*

1-3, 6-7 stratoj en Bergedorf
1 Töpfertwiete
2 Sachsentor
3 Brookdeich
4 Brookwetter - malgranda rivereto kiu kuras apud la strato Brookdeich
5 Wetter – mallongigo por 4
6 Töpferhof
7 Wentorfer Straße

En la 50-aj jaroj ankoraŭ ne ekzistis la Bergedorfer Straße.

***La loko Bergedorf*** *unue estis menciita en dokumento en 1162. Hamburg-Bergedorf estas hodiaŭ la plej orienta urbodistrikto de Hamburgo. Ĉi tie naskiĝis la fama komponisto Johann Adolph Hasse. En Bergedorf troviĝas la nura pluviva kastelo en la Hamburga urboregiono. La unua fervoja linio en norda Germanio troviĝas en Bergedorf. Dum la epoko de Nazia Germanio, en distrikto Neuengamme estis granda Koncentrejo. Interalie en Bergedorf aktivis la eksa germana kanceliero Helmut Schmidt dum multaj jaroj.*

*...el diversaj Vikipediaj paĝoj*

Michael Lennartz
https://esperanto-sh.blogspot.com/2013/10

# La nordfrisa lingvo

Jam antaŭ du mil jaroj ĉe la bordo de la akvejo, kiun ni nomas »Norda Maro«, loĝis popolo, kiun la romianoj nomis »Frisii« - frisoj. Tiu popolo ekzistas - almenaŭ laŭ la nomo - ĝis hodiaŭ. La nuntempa Frislando ne estas unueca teritorio, sed konsistas el pluraj disaj regionoj, en kiuj oni parolas frisajn dialektojn:

- la nederlanda provinco Frislando (ĉefurbo: Leeuwarden, frise Ljouwert; en Leeuwarden naskiĝis la germana verkisto kaj socialdemokratia politikisto Johano Strasser) en Nederlando, kiun la germanoj nomas »okcidenta Frislando«,

- la regiono ĉirkaŭ la komunumo Saterland en la germana partoŝtato Malsupra Saksio, en la cetera »orienta Frislando« oni ne parolas frisan, sed platdiĉan dialekton,

- la regiono Norda Frislando, kiu estas pli malpli identa al la distrikto »Nordfriesland« de la germana partoŝtato Ŝlesvig-Holstinio.

La nordfrisa lingvo disfalas en pli ol dek dialektoj, el kiuj la plejmulto aŭ formortis aŭ estas formortonta. Sur la insuloj Amrum kaj Föhr la lingvo vivas.

La diferencoj de la lokaj (vilaĝaj) dialektoj estas malgrandaj. Sur la insulo Föhr ekzistas du subdialektoj: okcidenta, kiu estas pli simila al la Amruma dialekto, kaj orienta. La plej grava dialekto (fakte la unusole nominda) sur la firma tero estas »Mooring«.

Sur la nordfrisaj marinsuloj (»Halligen«) oni jam ne parolas la frisan, sed la platdiĉan.




*Dullingvaj surskriboj sur la ŝildoj en la staciodomo de la haveno de Dagebüll en Norda Frislando.*

La nordfrisa lingvo estas rekonata kiel lingvo de nacia minoritato kaj ricevas ŝtatajn agnoskon kaj subvenciojn. La universitato de Kiel (ĉefurbo de Ŝlesvig-Holstinio) instruas la frisan lingvon, same oni povas lerni ĝin en lernejoj kaj popolaj altlernejoj. Multaj lok- kaj stratonomoj estas en germana kaj nordfrisa lingvoj.

Ĉiumatene de la oka ĝis la naŭa horo okazas radio-elsendoj sub la nomo »FriiskFunk« kadre »malferma radiofonia kanalo« (iel popola radiofonio). Diversaj

institucioj penas konservi kaj progresigi la lingvon, ekzemple »Friesenrat« (nordfrisa konsilantaro), la nordfrisa fako de la universitato de Kiel, la Nordfrisa Instituto en Bredstedt kaj la Andersen-Hus (domo de Andersen) en Niebüll (Bredstedt kaj Niebüll estas urboj en la distrikto Nordfriesland).




Tamen - la nordfrisa lingvo vivas ĉefe pro privataj agado kaj engaĝiĝo kaj ĉiutaga uzado. Institucioj kaj universitatoj solaj ne povas vivteni lingvon. En nordfrisaj vilaĝoj vi povas eniri vendejon kaj renkonti personojn, kiuj gaje interparolas - kaj vi komprenas nenion. Mi foje veturis sur la insulo Föhr per aŭtobuso de Wyk al Utersum.

Tie tri virinoj sidis en la antaŭo de la veturilo kaj vigle babilis kun la veturigisto - nordfrise, kompreneble.

Cetere: Modernaj vortoj eniras la lingvon laŭ sia origina formo. Do, se mankas frisa vorto, oni simple uzas la koncernan germanan.

Vortaroj, gramatikoj kaj lernolibroj apenaŭ ekzistas. La eldonisto Jens Quedens, posteulo de Volkert Martin Quedens, kiu kune kun Paul Köhn fondis en 1890 tion, kio poste estiĝis la urbo Wittdün, proprakoste kaj senprofite eldonas vortaron kaj diversajn belliteraturajn librojn. Gazetoj ne (plu) ekzistas.




*(Eltiraĵo el iama nordfrisa gazeto)*

Kaj jen tio montras la komplikecon de la situacio. La nordfrisa lingvo estas parolata de ĉirkaŭ dek mil homoj

(tio estas eble tri mil familioj), sed ili parolas ne »nordfrisan lingvon«, sed iun el la diversaj dialektoj. Oni povas verki lernolibrojn aŭ vortarojn - sed en kiu dialekto, je kiu prezo?

La Amruma dialekto havas fortan subtenanton en la persono de Jens Quedens, sed laŭ nombro de la parolantoj la firmteraj dialektoj (ĉefe »Mooring«) estas plej grandaj. Ne ekzistas iu tendenco krei komunan lingvan bazon, unuecan aŭ norman nordfrisan lingvon.

Homoj, kiuj science okupiĝas pri la lingvo, ofte estas nefrisoj: angloj, nederlandanoj, germanoj. Ŝtataj subvencioj kaj universitata instruado ne generas per si mem norman lingvon, sed norma lingvo estas kondiĉo por literatura verkado, presado de gazetoj kaj nombro da legantoj, kiu ebligas (preskaŭ) sensubvencian eldonadon. Same inter dek mil parolantoj vi nur malfacile povas trovi homojn, kiuj kapablas verki aŭ traduki.

Ligiloj:

Friiskfunk (radiofonio en nordfrisa lingvo):
http://www.oksh.de/sh/machen/projekte/friiskfunk/friiskfunk.php

Nordfriisk Instituut (Nordfrisa Instituto):
http://www.nordfriiskinstituut.de/

Vikipedio en nordfrisa lingvo: http://frr.wikipedia.org/wiki/Nordfriisk

Kunmetaĵoj:

**ag**·ad·o | **akv**·ej·o | alt·**lern**·ej·o | bel·**literatur**·o | ĉef·**urb**·o | ĉiu·**maten**·e | ĉiu·**tag**·a | dis·**fal**·i | **ebl**·ig·i | el·**don**·ad·o | el·**don**·ist·o | **engaĝ**·iĝ·o | en·**ir**·i | **est**·iĝ·i | firm·**ter**·a | **Fris**·land·o | for·**mort**·i | for·**mort**·ont·a | **instru**·ad·o | inter·**parol**·i | **komplik**·ec·o | **kompren**·ebl·e | **komun**·um·o | **konsil**·ant·ar·o | **leg**·ant·o | **lern**·ej·o | lern·o·**libr**·o | lok·**nom**·o | mal·**facil**·e | mal·**ferm**·a | mal·**grand**·a | mal·pli | mal·**supr**·a | mar·**insul**·o | **nask**·iĝ·i | **nederland**·an·o | ne·**fris**·o | **nom**·ind·a | nord·**fris**·a | nun·**temp**·a | **okup**·iĝ·i | **parol**·ant·o | **parol**·at·a | part·o·**ŝtat**·o | plej·**mult**·o | **politik**·ist·o | **post**·e·ul·o | **progres**·ig·i | **pres**·ad·o | propr·a·**kost**·e | radio·el·**send**·o | re·**kon**·at·a | **rom**·i·an·o | **Saks**·i·o | sen·**profit**·e | sen·**subvenci**·a | social·**demokrati**·a | strat·o·**nom**·o | sub·**dialekt**·o | sub·**ten**·ant·o | **unu**·ec·a | unu·**sol**·e | **vend**·ej·o | **verk**·ad·o | **verk**·ist·o | **vetur**·ig·ist·o | **vetur**·il·o | **vir**·in·o | viv·**ten**·i | **vort**·ar·o

---

*Sant a 25.09.2010 jaft at baal achgen dai am maalem tesken klook 8:00 an klook 10:00 üüs fein fresk spriak uun't radio tu hiaren.*

*öömrang faan Leif Quedens, Oomram*

*Ekde la 25-a de septembro 2010 oni povas aŭdi nian belan frizan lingvon en la radio preskaŭ ĉiumatene inter la 8:00 kaj la 10:00 a.m.*

---

*https://friesische-freihe.it/category/at-fresk-spriak/*

ChatGPT

## Eperanto-reklamo



# Malkovru la magion de Esperanto!

Saluton, vi! Ĉu vi pretas eniri en mondon, kie limoj malaperas kaj rilatoj estas kreataj? Lasu min rakonti al vi pri lingvo, kiu ne nur ligas vortojn, sed ankaŭ korojn - Esperanto.

Esperanto ne estas ordinara lingvo, ĝi estas vojaĝo al la estonteco, aventuro, kiu ligas nin ĉiujn.

Kiel juna Esperanto-entuziasto, mi volas rakonti al vi pri mia pasio por ĉi tiu mirinda lingvo. En Esperanto, mi malkovris mondon, kie homoj el diversaj kulturoj kaj fonoj povas komuniki unu kun la alia sen senti lingvajn barierojn.

Imagu, ke vi povus komuniki kun homoj el ĉiuj anguloj de la mondo sen iam senti, ke vi ne povas konkuri. Esperanto estas tiel facile lernebla, ke ĝi permesas al vi eniri internacian komunumon de samideanoj, kiuj estas tiel ekscititaj pri la ideo de mond-samkompreno kiel vi.

Sed Esperanto ne estas nur lingvo - ĝi estas movado. Movado, kiu staras por paco, kompreno kaj kunlaboro. Movado, en kiu ni festas diverson kaj samtempe malkovras niajn similecojn. Esperanto estas kiel ligo, kiu kunligas korojn de homoj tutmonde.

Kiam vi lernas Esperanton, vi fariĝas parto de komunumo, kiu kreas amikecojn translandajn kaj kunhavigas kulturan riĉecon. Vi vidos la mondon per novaj okuloj, kaj la magio de ĉi tiu lingvo tuŝos vian koron.

Venu kaj aliĝu al ni! Eniru la mirindan mondon de Esperanto, kaj lasu la entuziasmon, kiun mi spertas, ankaŭ ekflami vian koron. Kunite ni povas krei mondon, kie kompreno kaj paco estas ĉefaj. Esperanto - la lingvo, kiu ligas korojn.

---

*Nun la robotoj varbas por ni! La tekston produktis ChatGPT unue en la germana lingvo. Poste mi lasis la AI traduki. Ankaŭ la bildo estas de la artefarita inteligenteco (craiyon.com).*

*Erik Tantal*

# Konsiloj de ChatGPT 3.5

Estas multaj manieroj, per kiuj esperantistoj povas efike reklami Esperanton kaj helpi disvastigi ĝin. Jen kelkaj konsiloj:

**Uzu sociajn mediojn:** Partoprenu en Esperanto-relataj grupoj kaj komunumoj sur sociaj retoj, kiel ekzemple Facebook, Twitter, kaj Instagram. Disvastigu informon pri Esperanto, kunhavigu interesajn artikolojn, kaj invitu aliajn homojn aliĝi al la Esperanto-movado.

**Kreu kaj disvastigu enhavon:** Skribu blogartikolojn, faru videoblogojn, aŭ kreu podkastojn pri viaj spertoj kun Esperanto. Disvastigu tiujn enhavojn per diversaj medioj. Enhavo povas esti amuza, eduka aŭ praktika.

**Partoprenu en Esperanto-eventoj:** Partopreno en lokaj, regionaj aŭ internaciaj Esperanto-eventoj estas bona maniero renkonti aliajn esperantistojn kaj disvastigi la lingvon. Via partopreno montras vian engaĝiĝon kaj entuziasmon por Esperanto.

**Instruu Esperanton:** Se eblas, volontu kiel instruisto aŭ organizu Esperanto-kursojn en via komunumo. Estas multaj interesitoj, kiuj povas esti alkutimitaj al la lingvo per via helpo.

**Kreu aŭ subtenu Esperanto-klubojn:** Se en via areo ne ekzistas jam Esperanto-klubo, vi povas krei unu aŭ subteni iniciaton por komunumigi lokajn esperantistojn.

**Kontaktu lernejojn kaj universitatojn:** Provu kontakti edukajn instituciojn por proponi lecionojn pri Esperanto. Studentoj povas havi intereson pri tiu lingvo, kaj instigi ilin plu studi ĝin estas bona ideo.

**Kreu kaj distribuu materialon:** Desegnu afiŝojn, folietojn aŭ aliajn grafikajn materialojn, kiuj disvastigas informon pri Esperanto. Disdonu ilin en lokaj lokoj kaj eventoj.


Pozitivaj efikoj de Esperanto en la komunikado inter homoj inkluzivas plibonigitan interkompreniĝon inter parolantoj de diversaj lingvoj, pli grandan rapidecon en la lernado de aliaj lingvoj post la mastro de Esperanto. Esperanto kreas internacian komunumon, kie homoj kun diversaj lingvaj fonoj povas renkontiĝi sen barieroj. Esperanto estas instrumento por krei pacan kaj interkompreniĝan dialogon inter homoj el ĉiuj partoj de la mondo.

---

*...kun kelkaj etaj korektoj...(Klaus Friese 08/02/24)*

# Esperanto-flago

[nekonata fonto]



Ĉi tiu Esperanto-flago bone taŭgas por dentpikilo! Simple faldu en la mezo kaj metu la flageton ĉirkaŭ la bastoneton, per gluo fiksu ĝin. Vi nun havas belaspektan pikilon por via fromaĝo aŭ simple ornamu la kolumon de via lana jako per la Esperanto-flago!



*AI-generita bildo de Craiyon, kiu bedaŭrinde ne  konas la stelon*


Helmut Lasarcyk

# Salto de la konscio

**Kiel integrale orientigita rigardo al la mondo ŝanĝas nian vivon**

**Enkonduko**

*E-libro, tradukis Klaus Friese*




La postmoderna epoko komenciĝis. Ĝi estas integrala, ĉar ĝi integras multajn perspektivojn, ĝi estas ampleksa kaj tuteca. Malaperis la tagoj de la pensado kun tro rigidaj asocioj, vidante nur la kolorojn nigra kaj blanka, konsideranta nur amikojn kaj malamikojn. Ĉi tie eniras la ekkono, ke neniu povas ĉiam erari. Ĉiu posedas veron, kiu meritas respekton. Neniu havas la absolutan veron.

La integrala pensmaniero egalas salton de la konscio, kiu nur estas komparebla kun salto el la mezepoko al la moderna tempo antaŭ 500 jaroj. Pripensantoj de tiu renversiĝo estas Jean Gebser, Pierre Teilhard de Chardin, Clare Graves kaj Ken Wilber.

Tiu libro ne estas 'New-Age'-produkto (de la Nova epoko), nenia nova ideologio kaj ankaŭ nenia konsilanto pri psikologio. Ĝi estas priskribo de ankoraŭ juna penso-koncepto, per kiu la komplekseco de la mondo estas pli bone komprenebla, pli bone ol iuj ajn alia koncepto el la tempo antaŭ la post-postmoderna epoko. La integrala ideo aĝas nur kelkajn jardekojn, ĝi disvolviĝis ekde la komenco de la nova jarmilo per salto kaj internacie.

Aliĝu al la ekscita vojaĝo tra la novaj ebloj kaj perspektivoj!

*Jen la germana titolo:*

---

Helmut Lasarcyk

**Bewusstseinssprung**

**Wie ein integral geprägter Blick auf die Welt unser Leben verändert**

**Eine Einführung**

---

# Mia trezoro

Tiu reta platformo ekzistas ekde la jaro 2018. Kun helpo de mia filo Jan mi instalis ĝin per la baza konstru-kesto de STRATO. Tial ĝi havas nur tre simplan strukturon. Vi trovas la ĉefpaĝon kaj kvar subpaĝojn, tiuj estas La Ora Testudo, Miksaĵo, Muziko kaj la Kolofono.

Mi klopodis prezenti ĉion en Esperanto kaj la germana lingvo, ofte sub mia pseŭdonimo Erik Tantal. Sed kelkfoje vi trovas nur la Esperantajn kontribuojn. La Kolofono estas nur en la germana lingvo.

Pro la simpla strukturo estas iomete malfacile trovi iun specifan tekston aŭ dosieron. Vi ĉiam devas rulumi supren kaj malsupren per la komputila muso. Sed je la komenco de la ĉefa paĝo estas pdf-dosiero kiu ofertas multajn hiperligojn.

# Kolofono

**Titolo**
Mikso el mia trezoro

**Versio 1.0**
1-a Eldono, 2024

**Aŭtoroj**
Klaus Friese kaj aliaj

**Tradukoj**
Klaus Friese

**Aŭtoraj rajtoj**
© Klaus Friese, Hamburg

**Retpoŝto**
friese@esperanto-hamburg.de

**Titolbildo**
AI-generita bildo de Craiyon

**Hejmpaĝo**
esperanto-klaus.de